

# juna. amiko

INTERNACIA KVARONJARA LERNEJANA ESPERANTO-REVUO

**Kial ne estus bona ideo  
plani vojaĝon per ĉi tiu aviadilo?**



**•Konkurso! Sendu vian respondon ĝis la  
30a de septembro 1992. Ni lotumos premiojn  
el inter la ĝustaj respondintoj! (kaj ne estos  
senpaga vojaĝo per ĝuste ĉi tiu aviadilo!)**

# ilei

INTERNACIA  
LIGO DE  
ESPERANTISTAJ  
INSTRUISTOJ

NUMERO

61

92/2

**N**e nur sur la apuda paĝo, sed ankaŭ tra kvar mezaj pagoj vi ĝuos la laboron de nia nova help-redaktoro, Esperantina Mirska. Vi renkontos ŝian plaĉan desegno-stilon kaj kapablon forĝi el vortoj rim-rakontojn por niaj pli junaj legantoj. Tiujn ni pli frue iom ignoris, ĉar la redaktoro mem preferas verki por pli aĝaj junuloj, kaj bonaj kontribuajtoj por niaj tre junaj legantoj malofte atingis nin en la necesa kvalito. Ĉar Esperantina intense instruis sep- kaj ok-jarajn infanojn en Budaörs, havanta komunan lingvon kun ili nur Esperanto, ŝiaj verkoj estas testitaj multfoje en la realo. Ni regule donos al ŝi spacon en la revuo, tiel modifante nian profilon.

Tio ne signifas, ke ni "maldungis" nian konatan desegniston, Pavel Rak, kiun via redaktoro ĝojis unuafoje renkonti lastatempe okaze de vojaĝo al Roterdamo kun reveno tra Prago. La nunaj ŝanĝoj en lia lando forprenas de li multan tempon, krome ni turmentis lin per ampleksaj desegno-petoj por la ĵus aperinta dua kajero de *Tendaraj tagoj*, sekve ni donis al li "ferio-tempon" de *Juna amiko* ĉi-foje. Sed liaj bildoj reaperos en estontaj numeroj.

La verko de Esperantina ekde paĝo dek du nomiĝas "Desegnata poemo"; ne timu, ke nia nova redaktoro estas "at-isto" en la "ata/ita" diskuto. Se vi ne scias, kio estas la "ata/ita" debato, petu al via instruisto *ne* rakonti al vi pri ĝi! Kvankam por nia revuo la poemo estas klare jam preta kaj sekve 'Desegnita', ĝi estas regule uzata kaj re-desegnata de lernantoj, kaj tion ni rekomendas al vi — en tiu senco ĝi estas "desegnata".

Neglektataj ne estas la pli aĝaj junuloj. Sur du pagoj ni prezentas kelkajn faktojn pri la stato de nia tero, memore al la giganta konferenco en Rio pri la hom-medio, hodiaŭ fininta.

*Juna amiko* estu legata kaj ĝuata de kvin ĝis dek kvin jaraĝuloj!

Estu salutata,

*Stefan MacGill, redaktoro. 14 junio 1992.*

**Juna amiko** — internacia revuo por lernejoj kaj komencantoj. Eldonata de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Aperas kvarfoje jare: februare, aprile, septembre, novembre.

**Redaktoro:** Stefan MacGill

**Help-redaktoro:** Esperantina Mirska

**Adreso de la redakcio:** Juna amiko, pf. 193, H-1368 Budapeŝt, Hungario.

**Abonprezo** en Hungario: 120 forintoj ĉe Hungara ILEI-sekcio: M. Kovács, Ady Endre u. 23-25c, H-1221 Budapeŝt.

**Abonprezo** por reform-eŭropaj landoj: 250 forintoj. Prezo ĉe la abonservo de UEA: 12,00 gld. Ĉe la kasisto de ILEI: 40 SEK (B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio. pĝk: 682117-7 (Stokholmo) Perantoj en tridek landoj aplikas enlandajn tarifojn kaj proponas rabatojn por kvantaj mendoj.

**Anonctarifo:** Kvaronpaĝo: 400ft en Hungario, 40 gld. aŭ kvar jarabonoj en aliaj okcidentaj valutoj. Duonpaĝo: 600ft, 60 gld. aŭ 6 jarabonoj. Tuta paĝo: 800ft, 80 gld. aŭ 8 jarabonoj.

## Nia korpo.



Jen la kapo kun hararo,  
supre frunto, okulparo,  
meze nazo ĉe la vango,  
ruĝa buŝo kun la lango  
kaj la lipoj - jen dentaro,  
ĉe la viroj la lipharoj.  
Estas kolo kaj la brako  
kun kubuto, jen torako,  
ene ripoj kaj la koro  
- jen aŭdiĝas batsonoro.



Umbiliko sur la ventro  
lokiĝita en la centro.  
Poste gambo: jen femuro  
kaj genuo, sube nuro,  
maleolo kaj la plando  
kun la fingroj ĉe la rando,  
fine havas ni kalkanon.  
Ĝe nur ĉi ĝuu sanon!

verkis: Esperantina Mirska.

# Tendaraj tagoj

Antaŭ unu jaro sur ĉi tiu paĝo ni prezentis al vi la unuan kajeron de nova lernolibro por junuloj inter la aĝoj de 10 kaj 14, Vi renkontis la tendaranojn Karlo, Adelo, Rikardo, Habibo, Aniko, Iŝvano kaj aliaj. Pluraj el vi certe studis el tiu nova lernolibro, kaj bone eklernis Esperanton. Sed nur ek-lernis. Nun, vi povos plu-lerni! Jes, aperis la dua kajero, kun pliaj aventuroj, ekskursoj kaj epizodoj.

Unue, la tendaranoj faras kanotan ekskurson al insulo en la rivero, poste ili veturas kune al la urbo kaj vizitas la besto-ĝardenon. En postaj vesperoj ili spektas filmon kun la titolo 'La Fantoma Stampisto' kaj organizas ne tute justan kvizon.

Tage, ili sportas en la Tendaraj Olimpikoj. Post leciono pri la vivo de Zamenhof, Natalio kaj Tuzla decidas verki teatraĵon — ĝi ja temas pri la Unua Libro, sed ne pri Zamenhof. Anstataŭ li, la ĉefa rolulo estas la majstro-spiono 005, kiu devas plenumi danĝeran kaj komplikan mision en la malmulte konata lando Volapukistano, akompanata de preskaŭ analfabeta kamelo. Sed la misio nur parte sukcesas, kaj fine de la libro, vi, la legantoj, devas plani pli sukcesan mision por repreni la Unuan Libron kaj reporti ĝin al la Centra Oficejo de UEA.

Sed antaŭ tio vi povos viziti la mondon de la fiŝoj kaj, reveninte al firma tero, partopreni la mirindan tendaran koncerton, kun teler-ĵonglado, fajro-buŝa drako, dancanta skeleto, surprizoj, spektakloj, akcidentoj kaj ... kaj multo pli!

Kuru tuj al via instruisto, kaj insistu, ke li aŭ ŝi mendu por vi la duan kajeron de *Tendaraj tagoj*!

*Tendaraj tagoj*, kajero 2, Stefan MacGill. Eldonis ILEI/UEA/HJEA, Budapeŝto, 1992. Ilustris Pavel Rak. 52p, Aldona koloro kovrile kaj sur dek enaj paĝoj. A4 formato, Kun gramatika resumo, ekzameno, vortlisto, dialogoj, rol-ludoj. Prezo ĉe ILEI: 45 svedaj kronoj, ĉe UEA: 15 gld. (ĉe ambaŭ triona rabato ekde 3 ekz.). ILEI: Bertil Andreasson, Södra rorum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; pĝk. 682117-7 Stockholm. En Hungario kaj reform-europo, turnu vin al la hungara ILEI-sekcio, Kovács Márta, Ady Endre u. 23-25/C, H-1221 Budapest. (140 forintoj, 110 ekde 6 ekz.)

## 57. Ni pretigu la salonon!

Specimeno

*La tendaranoj prezentos koncerton sabate. Sed la salono ne estas preta.*

*Mateo kaj grupo venas; ili pretigos la salonon.*

**Mateo:** Vere, la salono ne estas preta. Mi vidas kurtenon, sed ne vidas podion.

**Natalio:** La kurteno ne estas tre bela.

**Mateo:** Vi pravas. Kiu beligos ĝin?

**Natalio:** Mi beligos ĝin. Aniko helpos min.

**Mateo:** Bone. Kaj la fenestroj estas malpuraj. Kiu purigos ilin?

**Roĝero:** Mi purigos ilin. Donu al mi la sitelon kaj tukon.

**Mateo:** Vi bezonas varman akvon. Ĉu estas varma akvo?

**Roĝero:** Ne. La akvo ne ĉiam estas varma. Mi varmigis akvon en la kuirejo.

**Mateo:** Nun, la seĝoj. Ili kuŝas en la angulo. Ili ne staras en vicoj.

Kiu vicigos la seĝojn?

**Petro:** Mi vicigos la seĝojn, sed unue mi purigos la plankon.

**Mateo:** Bona ideo! Efektive, ĝi estas malpura. Vi trovos balailon en la kuirejo. Balau la plankon kaj poste vicigu la seĝojn.

Nun, ni bezonas podion.

**Tuzla:** Ni uzu tablojn. Vidu, en la angulo estas du tabloj, apud la seĝoj.

**Petro:** Kaj mi vidis tablojn en la kuirejo. Mi portos ilin.

**Dimitro:** Ni povos porti la tablojn de niaj dormejoj.

**Mateo:** Bone, portu la tablojn. Ni bezonas ilin kune. Ni grupigu la tablojn malantaŭ la kurteno. Al la laboro!

**Donu la ordonon per verbo -ig-.**

1. La stelo estas pala. Ĝi devas esti pli *verda*.
2. La seĝoj estas malpuraj. Ili devas esti pli *puraj*.
3. La drako devus esti pli *sovaĝa*.
4. La suno estas preskaŭ *senkolora*.
5. La prezo de la enir-bileto estas tro *alta*.
6. La ŝuoj por la aktoroj devas esti en *paroj*.
7. La papera suno falas. Ĝi ne estas sufiĉe *solida*.
8. La balonoj estas tro *malgrandaj*.
9. Sep-hora koncerto? Tio estas tro *longa*.
  1. La kurteno ne estas *rekta*.
  2. Via voĉo ne estas sufiĉe *laŭta*.
  3. La lumo ne estas sufiĉe *forta*.
  4. La reĝo devas esti pli *dika*.



# SAVU LA TERON

**S**ur kia planedo vi devos vivi post la jaro dumil? En kiu stato vi transdonos la planedon al *viaj* infanoj? Ĉu vi kaj ili havos spacon vagi kaj promeni, havos puran aeron por spiri, sufiĉan manĝaĵon por vivi? Ĉu videblos plu agloj, tigroj, ursoj, delfenoj, ĉu eblas kuri laŭ plaĝoj kaj plonĝi en puran travideblan maron?

Jen kelkaj el la gravaj demandoj, kiujn oni frontas kaj studis en la plej giganta konferenco iam ajn organizita sur la tero. Ĝi okazis meze de junio en la brazila mar-borda urbo Rio de Ĵaneiro. Cent ŝtatestroj partoprenis, kaj 30,000 aliaj ekspertoj kaj aktivuloj. Jen detalaj temoj diskutitaj:

- **Ozona tavolo:** Tio troviĝas alte super la tero kaj ŝirmas nin de la danĝeraj ultra-violaj radioj de la suno. Sed en la lastaj dek jaroj la kvanto de ozono malkreskis je 4% en la norda hemisfero kaj 8% en la suda. Ĝi malkreskas pro gasoj kun la nomo CFC, kiujn ni uzas en fridujoj kaj en ŝpruc-skatoloj.

- **Nutraĵo:** Pro manko de pluvo, kresko de la dezertoj, erozio (forblovo kaj forfrotado de grundo pro manko de arboj) kaj pro kresko en la nombro de homoj, la po-kapa produktado de grenoj en Afriko falis je 28% de post 1967.

- **Danĝera aero:** Multaj urbegoj havas seriozan problemon pri malpura aero, pro industrio kaj tro da aŭtomobiloj, foje kun malbon-kvalitaj motoroj kaj benzino. Danĝeraj gasoj kiel plumb-oksidoj, sulfur-oksidoj ktp. damaĝas la sanon, precipe de infanoj. Kiam la smogo en Ateno atingas malbonan stadion, ĝi regule mortigas dozenon da homoj ĉiutage.

- **Orienta eŭropo:** Tie dum multaj jaroj oni klopodis kreskigi la industrian tre forte sen atenti la efikojn.

En Ĉeĥoslovakio 179 kilogramoj da sulfur-dioksido eniras la aeron ĉiujare por ĉiu loĝanto. La responda cifero por Francio estas 27 kilogramoj. La rivero Vistula, la plej granda en Pollando, estas tiom malpura, ke ne eblas uzi ĝin eĉ por industriaj celoj.

- **Arbaroj:** Ni bezonas la arbarojn; ili estas la 'pulmoj' de la mondo. Ili foprenas el la aero la

**Kio estas procentaĵo? Ni skribas ĝin tiel: %. Ĝi indikas parton aŭ frakcion de io: ekzemple, kiom plena estas la glasoj:**



Plena	Duon-plena	Kvaron-plena	Dekon-plena	Mal-plena
100%	50%	25%	10%	0%

karbon-dioksidon, kiun ni kaj niaj fabrikoj kaj maŝinoj 'elspiras', redonante oksigenon, kiun ni bezonas. Sed en la lasta jar-deko, la areo de tropikaj arbaroj malkreskis de 1.9 miliardoj da hektaroj ĝis 1.7. En la lastaj dudek jaroj ĝis miliono da specioj (plantoj kaj bestoj) malaperis por ĉiam el tiuj arbaroj. En 1970 perdiĝis ĉ. 30.000 specioj, sed en 1980 jam 50.000.

Pri konservado de la arbaroj, pri protekto de la biologia diverseco, pri transiro al eterne funkciigebla vivstilo oni diskutis kaj intencis subskribi kelkajn interkonsentojn. Sed plejparte tiuj dokumentoj ne fariĝos leĝoj, sed nur rekomendoj.

Baza problemo estas, ke la plej severaj ekologiaj krizoj okazas en malriĉaj landoj, ĉar ili ne havas la monon pagi la purigon. Krome,

la tropikaj arbaroj troviĝas ĝenerale en malpli riĉaj landoj. Ili respondas al la riĉaj landoj: 'Vidu, vi jam dehakis viajn arbarojn, uzis la lignon, enkondukis agrikulturon kaj industrion kaj iĝis riĉa. Kial ni ne rajtu fari same por nutri niajn popolojn kaj krei por ili laborlokojn? Se vi volas bremsi nian progreson, vi kompensu nin; se vi volas insisti, ke ni solvu ekologiajn krizojn, vi kontribuu al tio, ĉar ni ne havas la monon kaj rimedojn por tio.' Je tio la riĉaj landoj

respondas nur flustre kaj malvolonte. La du paneloj indikas la diferencegon inter riĉaj kaj malriĉaj landoj.

La esenca demando estas, ĉu registaroj, industriaj ĉefoj kaj konsciaj individuoj el ĉiuj mondpartoj pretas kunlabori kaj pagi por realigi tiujn rekomendojn el Rio.

**Hinda Unio (Bharatio) havas**

**16%**

**de la monda loĝantaro. Ĝi uzas**

**3%**

**de la monda energio, eligas**

**3%**

**de la CO<sub>2</sub> produktita kaj havas**

**1%**

**de la monda GNP (riĉeco).**

**Usono havas**

**5%**

**de la monda loĝantaro. Ĝi uzas**

**25%**

**de la energio en la mondo kaj eligas**

**22%**


**de la tuta karbon-dioksido (CO<sub>2</sub>) kaj havas**

**25%**

**de la monda riĉeco (GNP).**

### **NI DEVAS KURI, NUR POR RESTI, KIE NI ESTAS**

Estas dubo, ĉu ni iam ajn povos nutri ĉiun sur la tero. La produktado de manĝaĵoj povos kreski, sed pli rapide kreskas la nombro da homoj sur la tero. En 1950 estis 2,5 miliardoj, nun estas 5,3. En la jaro 2000 estos laŭ nunaj supozoj 6,3. En 2010 estos 8,5, en 2050 estos jam dek miliardoj. Nur post tiu am la kresko povos moderiĝi.




## La scivolaj marsanoj

La Tero jam delonge interesis la marsanojn. En la teleskopoj, celitaj al la Tero, estis videblaj akra-pintaj montoj, kaj la marsanoj amis altecon, amis similan atmosferon, al tiu de la propra planedo.

La alteriĝo sukcese finiĝis, la marsanoj prosperis per miraklaj sukcesoj. Ilia kosmoŝipo malleviĝis ĝuste sur la montan placeton, algluiĝinta antaŭ la vertikala monta muro — tio estis ilia revo. Ripozinte ili eltiris la ŝnurojn, la hokojn, la martelojn kaj kun preteco eksturmis sur la montan fortekejon. La historia esplorado de la nekonata planedo Tero komenciĝis — vivo povas ekzisti nur tie — sur la suproj, en la ĉieloj de pura aero, decidis la marsanoj.

La najloj enpikiĝis en la muron en unu momento, la ŝnuroj flugis pli alten kaj alten, la hokoj kaj la muskoloj kuntiris la marsanojn supren; ili komencis spiri ĉiam pli facile kaj facile, iliaj korpoj fortiĝis. Ili estis montogrimpistoj de altega klaso. Vivo sur la planedo Tero dume ne montriĝis, ĉirkaŭe eĉ ne unu estaĵo videblis. Sed ili estis tre obstinaj, tiuj marsanoj, ili persiste supren grimpis al la suproj. Ilia kampadejo restis fore, malsupre, sur la monta placeto. Tie komforte restis ilia hela tendo, brilanta en la suno kiel ruĝa makulo. La marsana kosmoŝipo suprenflugis al la orbito kaj atendis ordonojn. La spertaj marsanoj scias, kio estas marstremo.



Tamen, la montaro ne estis tute senhoma. Sur la vertikala muro, sur la vojo al la monto-supro, dronante en ŝvito kaj rememorante pri ĉiuj sanktuloj kaj pekuloj de la Tero, grimpis du oranĝaj makuloj — Ĵak kaj Pat decidis trompi la parvenuon Pejn kaj lia flavaĥta kuniranto Lan. Ili, Ĵak kaj Pat, devas konkeri la monto-supron la unuaj. Tio estos sensacio, ĉiuj konsterniĝos, kiam ili aperos de ĉi tie, de kie neniu iam ajn atendis grimpantojn. Nur supreniri tiun malbenitan muron kaj sukceso estos en la poŝo, kiel dolaro en la pantalojn. Ili pene supren grimpis ĝis la horizontala placeto, kie ili povos ripozi.

Diablo prenu, kaj kio estas tio? Kies estas tiu ĉi tendo, arogante brilanta sur la neĝo, kiaj bonegaj glacihakiloj, hokoj, botetoj kaj malpezetaj ŝnuroj?

Kia ruzulo estas tiu Pejn, kiu aĉetis ie la plej novan ekipaĵon kaj preparis sian rifuĝejon antaŭe. Vespere ili ĝuste atingos ĉi tiun rifuĝejon kaj tiam... ripo-



zinte ĉi tie en varmo, sekiĝinte... ili facile atingos la pinton! Ne, tio ĉi ne devas esti. Tiu Pejn estas simple malnobulo.

La ideo aperis samtempe ĉe ambaŭ. Kvar viglaj manoj faris ĉion rapide kaj lerte. La tendo kaj ekipaĵo malaperis, englutitaj de la profunda krevo. La neĝ-ventego surblovis ĉiujn spurojn.

"Jen nun ili venu," Jack ridegis: "Ni kurvenkos ilin kiel monta ŝafo lacan porkon".

Tamen, Ĵak kaj Pat malgajnis, suprenirinte lastforte al la supro post unu horo, ili trovis jam tie Pejn kaj Lan, kiuj estis venintaj laŭ la normala, malkruta flanko.

La marsanoj reveninte sian kampadejon kaj trovinte nek tendon nek ekipaĵon supozis ke, tamen, en la planedo ekzistas raciaj estaĵoj.

*El la rusa tradukis  
Peter Savolainen, Kohtla-Jarve, Estonio.*



### Sur la rivera bordo


*Tradukita de s-ro Amevor Rovema, Togolando.*

*Marŝo*

Sur la rivera bordo dum promenado      *Kia*  
malpeza vento!      Akvo del' fonto!      *Rebartaĵo:*      Mi kuŝis en

la veprejo      aŭskultante      la kanton      Aŭskultante

la herban kanton.



# Kruc-enigma

(R) =  
Uzu nur la radikon.

## Horizontale:

1. urba sur-rela veturilo
5. ujo simila al skatolo
10. havi samsonajn finaĵojn. (vortoj)
11. loko, kie loĝas reĝo.
13. ripete aŭ kontstante fari ion.
14. elmeto de io, por ke ĝi estu videbla.
15. prefikso por montri moralan malbonecon.
16. citi aŭ aludi aŭ preparoli ion.
17. kvaroble kvar minus duoble sep.
18. granda voĉ-muzika verko (R)
19. subtera parto de domo (R)
20. trairejo en konstruaĵo per kiu oni povas atingi la ĉambrojn. (R)
22. birdo kun granda kolorplena vosto.
23. loko, egal-distanca inter du ekstremoj.
24. identa, nedistingebla.
25. nobela sinjorino; ankaŭ ŝaka kaj kartluda figuro.
26. en la vico malantaŭ la dekkvina.
29. specio de bovo preskaŭ formortinta.
30. mirindaĵo, ŝajne kontraŭ la leĝoj de naturo. (R)
31. prefikso montrante parencecon.
32. tiu, kiu strebas superi alian.
33. mal-jes.
34. monunuoj en Irako, Tunizio kaj aliaj landoj.
35. amfibia besto, kiu brek-brekas.
36. parto de Svislando, kie oni uzas la romanĉan lingvon.
38. jubilo, hurao, feliĉo.
39. helena dio de amo kaj amoro.
40. ripeta serio de eventoj.

**Vertikale:**

1. La movo de veturiloj (R)
2. Montri per voĉbruo subitan gajecon.
3. Senti fortan emocion al iu; kun respekto, amikemo, deziro kaj multo pli.
4. persona pronomo per kiu parolanto aludas sin mem.
5. grava, kelkfoje nekuracebla malsano (R)
6. kaŭzi, ke io ekzistu. (R)
7. mallarĝa longa formo, kutime por ŝtofo. (R)
8. ĉin-devena trinkaĵo.
9. konjunkcio uzata por esprimi komparojn.
11. komerca skriba kalkulo pri ŝuldoj aŭ bonhavo.
12. la korpa organo per kio oni vidas.
14. poste pagota servo.
16. flava legomo.
17. ne povas eviti.
18. unu parto de lakto.
19. ĝibo-hava dezerta besto. (R)
21. markonkaĵo manĝebla.
22. religia festo ĉ. tri monatojn post kristnasko.
24. serio da gradoj sisteme kaj regule aranĝitaj.
25. kaŭzi, ke io estu malcerta. (R)
26. meblo por dormi aŭ ripozi.
27. miso.
28. granda larĝa strato, kutime kun arboj ambaŭflanke.
30. eltiros mineralojn el la tero.
32. baza manĝaĵo en la plimulto de Azio.
33. metala stangeto kun kapo kaj pinto por liksi objektojn. (R)

34. voĉe eligi vortajn komunikojn. (R)
35. granda ŝtono (R).
37. prefikso kun la signifo: denove.
38. persona pronomo por objektoj kaj bestoj.

*SMG*

## **Nigra pano** (Fekete kenyér)

**Sándor Petőfi**

Vi kial havas zorgon, bona panjo?  
Ĉu tial, ĉar tre nigras via pan'?  
Ĉu timas vi, ke fore via filo  
Al blanka pano kutimiĝis jam?

Ne gravas, panjo: jenan panon donu  
Kaj povas esti ajne bruna ĝi,  
Nenie gustas pli al mi la blanka,  
Ol hejme la plej nigra pan' de vi.

*Tradukis: Miklós Fehér*



# Desegnata poemo

verkis kaj desegnis: Esperantina Mirska




Estas bulko kaj la pano, ora fiŝo kaj banano,



2

10

ronda cirklo, longa streko, eta duo, granda deko,






jen la ŝnuro, blanka velo, la muŝfungo kaj ombrelo



*estas ĉapo kaj la ŝuo, larĝa pordo, ŝlosiltruo*



*estas pruno, ruĝa pomo, alta arbo, eta domo*





*jen okulo, bona koro, la folio kaj la floro*



*dolĉa kuko, griza muso, nigra rado, blua buso*



*estas birdo kaj telero, bunta plumo kaj letero*



*triangulo apud kubo, duonluno kaj la nuboj*



**FINO!**

*jen botelo, ene vino, la kaliko kaj jam*

## Desegnata ĉu desegnita poemo?

Vi vidas la desegnititan poemon, sed kutime mi legas la poemon kaj samtempe la infanoj desegnas ĝin. Cetere vi povas diversmaniere ludi per tiu ĉi poemo. Jen kelkaj ekzemploj:

1. Preparu ĉirkaŭ 30 paperfoliojn de A4 grandeco. Sur ĉiu peco desegnu unu aŭ du sufiĉe grandajn kaj buntajn bildojn. Poste kungluu ĉiujn pecojn. Vi ricevos paperstrion longan je ĉirkaŭ 9 metroj. Nun vi povas prezenti la poemon al la spektantaro. Kelkaj infanoj staru en la vico tenante la paperstrion super la kapoj kaj unu infano kun montrilo en la mano, kvazaŭ dirigento, montru la bildojn dum ĉiuj bele deklamas korse la poemon.


2. Vi povas fari po unu belan, koloran desegnaĵon sur apartaj paperpecoj, miksu ilin kaj poste kunmetu ĉiujn bildojn laŭ sinsekvo de la vortoj en la poemo. Ĉi maniere vi povas ludi kun via pli juna fratineto aŭ frateto. Malgrandaj infanoj tre ŝatas ludi per koloraj bildoj kaj ege rapide lernas poemojn.

Vi rajtas ŝanĝi iom la poemon. Ekzemple desegnita de vi buso povas esti blua aŭ ruĝa aŭ verda. Atentu nur, ke estu bona ritmo. Tion vi povas kontroli dirante la poemon kaj samtempe klakante per la manoj.

3. Vi povas simple deklami la poemon kaj per la manoj gesti ĝin (kvazaŭ vi desegnus en la aero).

Certe vi havas ankaŭ aliajn kaj bonajn ideojn kiamaniere oni povas ludi per tiu ĉi poemo. Bonvolu skribi al mi pri tio. Mi atendas viajn leterojn.

*Via Esperantina.*



**Du  
rakontoj  
el Ĉinio**

### **Geedzoj konkurakiris kukojn.**

Iam unu paro da geedzoj havis entute tri grandajn kukojn. La geedzoj dividis la kukojn por manĝi. Kiam ĉiu formanĝis po unu kukon, restis unu kuko. Kiu devis manĝi tiun solan restantan kukon? Tiuj geedzoj ĵuris laŭ Dio, dirante, ke tiu, kiu parolos unue ne rajtos manĝi tiun restantan kukon. Post la ĵurado, geedzoj ne plu kuraĝis paroli unu al

la alia. Ili tiel faris nur por manĝi la kukon. Sed iam venis ŝtelisto. Li eniris en ilian domon kaj volis ŝteli ion. Rigardante, ke la geedzoj ne krias, li trankviliĝis. Pro tio, ke la geedzoj jam faris ĵuron laŭ Dio, neniu el ili kriis kaj rigardadis gape dum la ŝtelisto prenis kion ajn, kion li volas. La kuraĝa ŝtelisto, rimarkinte ke tiuj geedzoj ne kuraĝis ekaŭdigi sonon aŭ vorton, fairĝis des pli aŭdaca. Demetinte ŝtelaĵojn sur teron, li iris ĝis antaŭ la edzino, diris al ŝi vortojn pri amo kaj volis senhonorigi ŝin. Tamen, la edzo vidante ĉion ĉi ankoraŭ ne ekparolis. Tiam la edzino puŝite trans la limon de tolero, koleriĝis kaj kriis: "Ŝtel! Ŝtel!" Samtempe ŝi riproĉis sian edzon dirante: "Kia ansero vi estas! Por povu manĝi unu kukon, vi eĉ ne kriis, kiam vi vidis ŝteliston! Neniam mi pensis, ke vi povis fari tiel!" Vidinte, ke la edzino unue ekparolis, la edzo plaŭdadis per la manoj kaj ridegis ĝoje: "Ha, ha, ha! Kia malsaĝa virino — tiu kuko apartenas certe al mi! Mi absolute ne donos al vi kukon, eĉ unu peceton!"

### **Aĉeti saĝon.**

Antaŭ multaj jaroj estis ŝtato, kie produktoj estis abundaj, popolanoj vivis feliĉe kaj trankvile, nenio mankis enlande. Ĉiuj estis kontentaj. Tamen iun tagon la reĝo diris al kortegano: "Sendu pli kapablan senditon al eksterlando por aĉeti aĵojn rarajn kaj kuriozajn, kiuj ne estas en nia lando!" Tuj kortegano sendis unu kapablan senditon iri al eksterlando por aĉeti tiujn objektojn demanditajn de la reĝo. Tiu sendito, kunportante multan oron por aĉetado vizitadis bazarojn, foirejojn, landon post lando.

Tamen ĉio, kion li vidis ne estis rara kaj eksterordinara, ĉion oni povis trovi en sia lando, do li nenion aĉetis. La sendito maltrankviliĝis irante en la foirejo, li ekĉagreniĝis pro tio, ke li ne povis plenumi sian mision, kiam li atingis finon de la foirejo. Subite li vidis unu saĝulon sidantan sur tero kiel vendisto. Nenio estis antaŭ li, tamen ŝajnis, ke li vendas ion. La sendito aliris antaŭ tiu maljunulo kaj demandis al li: "Estimata sinjoro, ĉu vi vendas ion? Kion vi vendas? Mi vidis nenion. Kial vi sidas ĉi tie en la foirejo?"

La saĝulo respondis: "Ĉi tie mi vendas saĝon".



"Saĝon? Kia estas la saĝo vendata de vi? Kiom kostas la saĝo?" demandis sci-vole la sendito. Saĝulo diris: "La saĝo, kiun mi vendas kostas kvincent mezurojn da oro. Vi devas pagi unue al mi oron kaj poste mi donos al vi saĝon."

Pripensinte, ke en lia lando oni vendas ĉiajn objektojn, nur neniam estis iu, kiu vendis saĝon, la sendito pagis kvincent mezurojn da oro al tiu ĉi saĝulo. Preninte la oron, la saĝulo diris al la sendito la saĝon. Tio estis nur kelkaj vortoj: "Antaŭ ol fari ion, oni devas bone pripensi kaj konsideri." Se tiu diro ne estas utila nun, ĝi estos certe utila iutage!" La saĝulo instruadis tiujn vortojn ĝis kiam sendito scipovis parkere ilin rediri. Post tio ili adiaŭis kaj disiĝis.

Aĉetinte la saĝajn dirojn, la sendito ekiris por reveni en sian landon kaj raporti tion al la reĝo. Kiam li estis preterpasanta sian domon, li volis reveni hejmen kaj rigardi siajn familianojn. Tiam jam estis profunda nokto, la luno estis brilanta en nokta ĉielo kaj aspektis eksterordinare hela. Li iris malpezpaŝe ĝis antaŭ la pordo de la domo, tra fendo en la pordo, li vidis, ke antaŭ la lito de la edzino, sur tero, estas du paroj da ŝuoj, tial li tuj eksuspektis, ke la edzino konkubis kun iu viro kiam li ne estis hejme. Li ekhavis ideon mortigi la gekonkubantojn. Ĝuste tiam, kiam li volis eniri en la ĉambron kaj mortigi sian edzinon kaj iun aĉan viron, la diroj instruitaj de la saĝulo eksonis en liaj oreloj. Li haltis kaj refoje li atente rigardadis. Fine li ekvidis klare, ke la persono, kiu kuŝas ĉe lia edzino estas fakte la propra patrino. Ho, ĉar post lia foriro de la hejmo, lia edzino malsaniĝis grave pro laceco, lia patrino akompanadis sian bofilinon tuttage kaj dormis apud ŝi por zorgi pri ŝi nokte. La sendito eltrovis, ke li eraris, do li ripetadis foje post foje la saĝajn dirojn, kiujn la saĝulo instruis al li. Aŭdinte la voĉon de la filo, lia patrino sidiĝis kaj demandis mirigite:

"Mia filo, kiam vi revenis?"

Enirinte en la ĉambron, la sendito murmuris al si mem senĉese: "Tro malmultekosta! Tro malmultekosta!" Konfuzata, la patrino demandis refoje: "Mia filo kien vi iris? Kian raran objekton vi akiris? Kial vi murmuradis senĉese al vi mem: 'tro malmultekosta, tro malmultekosta'? Kiel vi fariĝis tiel?"

La sendito respondis: "Mia patrino kaj mia edzino, se oni donus al mi dek mil mezurojn da oro, mi ne forvendus la instruon de saĝulo. Cetere mi aĉetis ĝin per nur kvincent mezuroj da oro; tio ne estas tro multekosta, ĉu?" Tiu rakonto pruvis, ke kelkaj instruaj vortoj superis profiton de mil mezuroj da oro!

*Liu Xiaojun, Ĉinio*



# La puto ĉe la fino de la mondo

(Angla fabelo)

Vivis iam reĝo kaj reĝino. La reĝo havis sian propran filinon kaj la reĝino havis sian propran filinon. La filino de la reĝo estis bonkora junulino kaj ĉiuj amis ŝin. La filino de la reĝino estis malbonkora kaj neamata de ĉiuj. La reĝino malmamis la filinon de la reĝo kaj ne volis, ke ŝi loĝu kun ili.

Do, jen, unu tagon, ŝi sendis junulinon al la puto ĉe la fino de la mondo, ordoninte alporti botelon da akvo. La reĝino pensis, ke la junulino neniam revenos. La filino de la reĝo foriris, preninte botelon. Ŝi iris, iris plu kaj plu, ĝis kiam venis al la poneo, ligita ĉe arbo. La poneo diris: "Liberigu min, mia bona junulino, ja mi estis malliberigita dum sep jaroj kaj unu tago."

"Jes, mi helpos al vi" diris la junulino.

"Saltu sur mian dorson" diris la poneo: "kaj mi vin transigos tra la dezerto, kovrita de akraj dornoj."

La poneo transigis la reĝidinon tra la dezerto, kovrita de akraj dornoj, kaj ili disiĝis. La junulino plu iris. Ŝi iris ĉiam plu kaj plu. Fine ŝi atingis la puton ĉe la fino de la mondo. Sed la puto estis tre profunda kaj ŝi ne povis ĉerpi de tie la akvon. Kiam ŝi rigardis suben, ŝi ekvidis tri tre malpurajn virajn kapojn. Ili alrigardis ŝin kaj diris: "Lavu nin, bona junulino, kaj viŝu nin per via pura antaŭtuko".

"Jes, mi lavos vin" ŝi respondis. Ŝi lavis tri malpurajn virajn kapojn kaj viŝis ilin per sia pura antaŭtuko. Poste la estaĵoj prenis ŝian botelon kaj alportis la akvon por ŝi. La tri viraj kapoj diris unu al alia: "Deziron, frato, deziron. Kion vi deziras al ŝi?"

"Se antaŭe ŝi estis bela, nun ŝi estu dekoble pli bela" diris la unua.

"Ĉiufoje kiam ŝi parolos, brilanto, perlo kaj rubeno falu de sur ŝiaj lipoj" diris la dua.

"Ĉiufoje kiam ŝi sin kombos, peco da oro kaj peco da arĝento falu de sur ŝiaj haroj" diris la tria.

La filino de la reĝo revenis hejmen, kaj se antaŭe ŝi estis bela, nun ŝi dekoble plibeliĝis. Ĉiufoje kiam ŝi parolis, brilanto, perlo kaj rubeno falis de sur ŝiaj lipoj. Ĉiufoje kiam ŝi sin kombis, peco da oro kaj peco da arĝento falis de sur ŝiaj haroj. La reĝino ege koleriĝis.

Ŝi ne sciis kion fari. Ŝi decidis sendi sian propran filinon al la puto ĉe la fino de la mondo. Ŝi donis al ŝi botelon kaj sendis ŝin al la puto. La filino de la reĝino iris plu kaj plu, ĝis kiam venis al la poneo, ligita ĉe arbo. La poneo diris: "Liberigu min, mia bona junulino, ja mi estis malliberigita dum sep jaroj kaj unu tago."

"Ho vi stulta estaĵo, ĉu vi pensas, ke mi liberigos vin?" ŝi ekkriis: "Ja mi estas la filino de la reĝino".

"Tiukaze mi ne transigos vin tra la dezerto, kovrita de akraj dornoj" diris la poneo. Kaj la filino de la reĝino estis devigata iri nudpiede, kaj la dornoj pikis ŝin. Baldaŭ ŝi apenaŭ povis iri. Ŝi iris ĉiam plu kaj plu. Fine ŝi atingis la puton. Sed ĝi estis tiom profunda, ke ŝi ne povis ĉerpi la akvon de tie. Dum ŝi sidis tie, tri tre malpuraj viraj kapoj alrigardis ŝin kaj diris: "Lavu nin, nia bona junulino, kaj viŝu nin per via pura antaŭtuko."

"Ho vi hororaj estaĵoj, ĉu ci pensas mi lavos vin?" Ŝi diris: "Ja mi estas la filino de la reĝino." Ŝi ne lavis iliajn kapojn kaj tial ili ne alportis por ŝi la akvon. Ili diris unu al alia: "Deziron frato, deziron. Kion vi deziras al ŝi?"

"Se antaŭe ŝi estis malbela, nun ŝi estu dekoble pli malbela." diris la unua.


"Ĉiufoje kiam ŝi parolos, rano falu de sur ŝiaj lipoj" diris la dua.

"Ĉiufoje kiam ŝi kombos sin, multo da pedikoj kaj multo da puloj falu de sur ŝiaj haroj" diris la tria. Kaj la filino de la reĝino venis hejmen kun malplena botelo. Neniu povas diri, kiom kolera la reĝino estis. Se ŝia filino estis antaŭe malbela, nun ŝi dekoble pli malbeliĝis. Kiam ŝi parolis, rano falis de sur ŝiaj lipoj, kiam ŝi sin kombis, multo da pedikoj kaj multo da puloj falis de sur ŝiaj haroj. Finfine la reĝino estis devigata forsendi sian filinon de la kortego.

*El la angla tradukis*

*Peter Savolainen, 2020 Estonio*

*Johvi., pr. Kosmonautide d. 94 kv. 13*



#### VORTKLARIGOJ

bonkora: helpema, afabla.

poneo: ĉevalido

ĉerpi: preni en fonto

dorno: planta pikilo

puto: truo en la tero, kie eblas akiri akvon.

pediko: besteto, kiu loĝas inter la haroj de bestoj aŭ homoj.

pulo: iom simila besto, piko-pova.

Ĉi tiu fabelo havas moralon aŭ mesaĝon..  
Kiu ĝi estas? Ĉu ĝi estas utila mesaĝo?  
Ĉu tiu mesaĝo estas ĉiam aplikebla al la vera vivo? Kiam jes, kiam eble ne?

# BOJ... BOJ... SALUTON!


Koran dankon pro Viaj ĉarmaj leteroj en kiuj Vi donis al mi multajn utilajn konsilojn, kiamaniere eduki hundidon.

Mia filo Yeti estis trege malsana sed nun fartas jam pli bone. La kuracisto, kiun ni vokis, venis kaj diris, ke Yeti ne plu povos vivi kaj devas morti! Sed mia sinjorino Esperantina estas vera sorĉistino. Ŝi bonege konas kuracplantojn kaj scias prepari el ili multajn efikajn kuracilojn. Ŝi tuj kuregis al ŝa herbejo kaj kolektis diversajn herbojn. Ŝi preparis el ili infuzojn, tre malbongustan kaj amaran. Yeti devis ĝin trinki kelkfoje tage. Post kelkaj semajnoj da pena kaj malfacila kuracado Yeti estas preskaŭ sana kaj salutas Vin kore.

Via Maks

## Reklamu en Juna amiko!

Jes, la nombro de niaj legantoj abrupte falis. Ni ne plu havas 3500. Tamen ni plue atingas dumil legantojn en klasĉambroj kaj studejoj en pli ol 50 landoj. Tio lokas Juna amiko klare inter la plej legataj E-revuoj. Niaj anonc-tarifoj estas nekredeblaj. Nekredeble malaltaj kaj nekredeble ignorataj. Se vi havas servon au eldonaĵon au renkontiĝon por junuloj au instruistoj — pere de ni diskonigu ĝin! Okdek guldenoj aĉetas tutan paĝon! Vidu la tarifojn sur paĝo du.



*El tiuj ĉi plantoj kaj multaj aliaj  
ni preparis kuracilon por yeti.*

### **Ekspedu ion per Juna amiko**

Ĉar nia poŝto ne ofertas tarifon je 50 gramoj, ĉiu ekzemplero de JA sendata al eŭropa adreso (ne aere) enhavas 65 liberajn gramojn da pagita afranko. Pli frue ni sendis malnovajn numerojn de JA, sed ili estas nun forsenditaj. Ni povos disponigi tiun lokon al movadaĵinstancoj volantaj dissendi informilon aŭ libreton. Vi pagus nur eksped-laboron se stoko estas liverita al ni. Alternative, ni povas oferti konkurencajn prezojn por komposti, presi kaj dissendi vian eldonaĵon!

## DEZIRAS KORESPONDI

### Bulgario

Marijanĉo (11 jara) kaj Stoilĉo (14 jara) - fratoj, Dolno Ezerovo, distrikto de Burgas, kv.34, bl.5 et.2.

Radka Borisova Stojanova, Str. Ivan Vazov 38 B ap.33, BG-7200 Razgrad

### Brazilo

Marcio Sousa Albuquerque, Rua Limoiero 85, BR-25850 Paraiba do Sul (RJ).

Fernanda Pereira Cordeiro, Tv.Comodoro Portela 70/102. BR-25800 Tres Rios (RJ).

Klaus Chaves Alberto, Tv. Dr. Bezerra 86. BR-25800 Tres Rios (RJ).

Mirian Marinha Silva, Rua Feliciano Lima, 215 ap 16 Pte. das Garcas BR-25800 Tres Rios (RJ).

Mario Justino Jr., Av. Visconde do Tio Novo 55, Centro. BR-25850 Paraiba do Sul (RJ).

### Hungario

9 gelernantoj 12-jaraj serĉas letergeamikojn tutmonde. Skribu al ilia instruisto: dr. Balazs Szemok, H-2737 Cegledbercel, Pozsonyi ut.2

### Jugoslavio

Junaj geesperantistoj (11-13-jaraj) deziras korespondi tutmonde. Esperanto-grupo, YU-23272 Novi Becej.

### Kubo

Alvaro R. Valdes Perdomo, La Caoba, Manacas, Villa Clara, 54510 Cuba.

### Litovio

Neringa Alisauskaitė, 235420 Kursenai, 17-jara knabino, interesiĝas pri muziko, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

Vilija Jakstienė, p.d. 429, 5802 Klaipeda instruistino kun 40 gelernantoj serĉas letergeamikojn tutmonde.

### Pollando

Magdalena Malcherek, ul. Zareby 42/20, 43-135 Tychy. 15-jara knabino.

Rafal Chimiak, str. Korczaka 18, PL-64-920 Pila. Deziras kor. pri ĉiuj temoj, kolektas pm. bk.

Joanna Kletkiewicz, PL- 87-617 Bobrowniki nad Wisla. 11-jara knabino. Dez. kor. pri ĉiuj temoj tutmonde.

Dagmara Tuszyńska, PL-87-100 Torun, Rubinkowo, str. Kosynierow Kosciuszkiwskich 12a/13. Pri ĉiuj temoj tutmonde.

### Rusio - SŜR

Mihailo Salangin, RUS-346360 Zverevo 1, Rostova regiono, Korso Ostasenko 19-45. 14-jara knabo, interesiĝas pri sporto, moderna muziko.

Mihail Brenstejn, 169935 Vorkuta, Komsomolskij, kv. Zapoljarnyj 32-78.

Jurij Lebedev, str. Holmogorskaja 7-167. RUS-129347 Moskvo. 15-jara knabo deziras korespondi tutmonde, kolektas insignojn, pm, bk, ŝatas vojaĝi.

Simkin Leonido, RUS-129343 Moskvo, Amundsena 6 kv. 143. dez. kor. tutmonde, interesiĝas pri medicino kaj akupunkturo.

E-Klubo, RUS-626440 Nijnevartovsk 6, (Siberio) str. 60 let oktjbrja 6-135.


Irina Jegorova, RUS-196158 Sankt Peterburg, str. Zvezdnaja 8-102. 14-jara knabino kolektas kalendarojn, bk, dez. kor. tutmonde kun gesamaĝuloj.

*Senpage ni aperigos alvokojn de junuloj kaj instruistoj - sed bv. skribi tre klare!*

- 1-4 konstruaĵo  
 2-4 mezurunuo por elektrotekniko  
 3-4 kutimo  
 4-6 valora metalo  
 5-8 ĝin ludas aktoro  
 7-13 ĉefurbo de Britio  
 8-11 movo de akvo  
 10-13 rivero en Rusio  
 11-13 ero frakcia  
 12-15 malmalnova  
 14-17 havebla en vendejo  
 16-19 urbo en Italio  
 18-2 nia planedo

# cirkla enigmo

Metu literojn anstataŭ la ciferoj laŭ la maldekstraj indikoj



Kompilis:

Johannes Palu  
 kun ĝelernantoj  
 Estonio

## APERIS LA TRIJARA LABORPLANO DE ILEI

La membroj de ILEI jam ricevis tiun planon por 1992-1994 kune kun la lasta numero de *Internacia Pedagogia Revuo*. Instruistoj kaj aliaj interesatoj, kiuj ankoraŭ ne estas membroj de ILEI, rajtas ricevi ĝin. Sur kvar paĝoj ĝi ne nur dismetas la planon sed ankaŭ prezentas fote la estraran teamon, kiu klopodos plenumi la laboron. Samtempe petantoj ricevos novan varbilon pri ILEI kune kun aliĝilo por membriĝi kaj mendi kelkajn el niaj eldonajoj. Dezirantoj bv. skribi al la kasisto de ILEI, s-ro B. Andreasson, Södra rorum pl. 455, S-242 74 Hörby, Svedio. Se eble bv. aldoni internacian respondkuponon por kovri la sendokostojn.

Ara: 30 ft.

## Tempo jam fora

**Mi volas reiri al tempo jam fora,  
al kie mi ludis infane,  
al la eta vilaĝo por mi karmemora,  
en medio mil-scena kaj riĉe odora,  
kaj ekvagi en penso laŭ vojo esplora  
antaŭ longe kun panjo manmane.**

**Mi vidas denove lernejon malgrandan  
en ombro de kverkoj multaĝaj.  
Lego-skribo ekvekis inklinon demandan,  
mi malfermis ludhore mangŝpakon pint-frandan,  
kun Kolombo mi trovis Nov-Mondon ter-randan –  
kun konsiloj atablaj kaj saĝaj.**

**Mi plaĉe kunligas en sento medita  
la ĉenerojn de vigla memoro –  
la odoro de fojno freŝfale falĉita,  
la fajrera forĝejo – vizito ekscita,  
la koncerto lerneja – eta rolo bandita –  
ĝuo-maŝojn de rido kaj ploro.**

**Mi naĝe, fiŝkapte memoras la fluon  
de l' rivero en ravo intensa –  
en vintro mi helpis neĝhomo-konstruon,  
en arbaro kaŝlude mi perdis bukŝuon,  
sonorigis preĝeje, ĝuante la bruon –  
kiel luksa la taglibro mensa!**

*Bertram Potts  
Nov-Zelando*

### **NOVAJ VENTOJ E-VENTOJ EVENTOJ**

Sub tiu dusenca titolo aperis nova gazeto, redaktata de la junaj hungaroj en Budapeŝto. Ĝi estas du-semajna inform-gazeto, kiu peras novaĵojn pri estontaj renkontiĝoj, novaj libroj, projektoj kaj servoj. Ĝi represas interesajn artikolojn el aliaj gazetoj. Petu tuj specimenon kaj informojn pri abonado de: Lingvo-studio, p.f. 87, H-1675 Budapest, Hungario; telefono kaj telefakso: (+ 36 1) 1288 258.